

FRIDERIKO VILHELMO

Prusa akcia kompanio por viv- kaj garanti-asekuroj

sub kontrolo de la regna kontrolistaro por asekuroj

Fondita 1866

BERLIN (Germanujo)

Fondita 1866

Kompania Kontrolantaro:

Victor, Herzog von Rati-
bor, Fürst von Corvey,
Prinz zu Hohenlohe-
Schillingsfürst, prezid-
anto

Georg Fromberg, Königl.
Geh. Kommerzienrat
in Berlin

Carl Heimsoth, Bank-
direktor in Dortmund
Moritz, Prinz zu Hohen-
lohe-Schillingsfürst

Bogdan, Graf von Hutten-
Czapski auf Smogulec

Eugen Mösche, Rentier
in Berlin

Günter Graf von Pfeil
auf Kreisewitz

Franz, Prinz von Ratibor,
auf Schloss Rauden,
O./S.

Clemens Graf von Schön-
born-Wiesentheid in
München

Paul Wachler, Dr. jur.,
Königl. Bergrat.

Direkcio:

A. Juliusburger, ĉefdirek-
toro

Advokato Loebinger, di-
rektoro.

Esperantista Ĉefa agentejo:

Max Gottgetreu,
Hannover (Germanujo),
Rundestrasse 13.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOĜO
* REKLAMA SERVO

Via Moŝto!

Du milionoj kaj tri kvaronoj da asekurituloj estas nuntempe la nombro de la personoj asekuritaj ĉe la vivasekura kompanio

„Frideriko Vilhelmo“.

Tio pravas, ke niaj asekuraj organizoj akiris-aprobon en vastaj rondoj.

Niaj polisoj donas la plej grandajn garantiojn kaj estas ne kontraŭ-protesteblaj de la komenco.

La teksto de l' paragrafo 9 de niaj asekuraj kondiĉoj estas: „ . . . Post finiĝo de l' unua jaro de la asekuro tiu ĉi ne plu povas esti kontraŭparolata, escepte ĉe intencita trompo.“

Niaj polisoj ne estas malvalidiĝeblaj, pro aŭtomata aliĝo en asekuron senkotizan okaze de nepago de l' premio, aŭ per pretendo de „asekuro-daŭriĝo senpagota“, per kio ne okazos malpliigo de l' asekurita sumo, nek depreno de nepagitaj premioj.

Niaj polisoj estas tutmondaj polisoj, tio estas: ili permesas vojaĝojn kaj restadon sur la tuta terglobo.

Nova aranĝo ebligas al ni, akcepti en asekuron kontraŭ laŭnorma premio eĉ personojn ĝis nun rifuzitajn.

Plue ni ofertas asekuron primortan sen kuracista esploro, asekura speco, kiu unue enkondukita estas en Germanujo de la FRIDERIKO VILHELMO, kaj kies sukcesoj eĉ hodiaŭ ne estas atingitaj de aliaj.

Da novaj aliĝproponoj estas senditaj al ni:

en jaro 1906 pri ĉirkaŭ 50 milionoj spesmiloj

„ „ 1908 „ „ 63 „ „

„ „ 1910 „ „ 77 „ „

Al niaj asekurituloj estas asignitaj el la komerca profito:

en jaro	1905	ĉirkaŭ	1	miliono	spesmiloj
„ „	1907	„	1 ¹ / ₂	„	„
„ „	1909	„	2 ¹ / ₄	„	„

Do, la asignitaĵoj por la asekurituloj dum kvar jaroj pli ol duobliĝis. Sekve de tio la elpagitaj de ni al la asekuritoj dividendoj ĉiam estis pli prosperaj, ol la projektoj.

Por mallongigita asekuro pri aĝo 30 kontraktita pri 10 000 spesmiloj, pagotaj post morto tuj aŭ plej malfrue en la sesdeka vivjaro, ni antaŭtaksis la rezuman pagon komence je ĉirkaŭ 6600 Sm.; la pagoj plimalaltiĝis en 1903 per plialtigo de la dividendo ĝis 6250 Sm., kaj poste reduktiĝis en 1910 pro plua plialtigo de niaj dividendoj ĝis 5800 Sm.

La „FRIDERIKO VILHELMO“ estas unu el la tre malmultaj kompanioj, kiuj ankoraŭ neniam malaltiĝis la dividendon.

Volontege ni starigos kaj sendos al vi precizan liston pri la kostoj por vivasekuro, se vi bonvolos sendi al nia esperantista ĉefa agentejo, al sinjoro

Max Gottgetreu en Hannover (Germanujo), Rundestrato 13

tian dcziron per almetita poŝtkarto, ne subigante vin per tio al kiu ajn devo.

Ĉiam preta al via dispono

altestime

FRIDERIKO VILHELMO

La Ĉefdirekcio Berlin.